

Taja Supo

de Viktoro Medrano

1996-01-15 ĝis 1996-02-01

Mia onklino Viveka, la plej juna fratino de mia patro, loĝadis en Bankoko en multekosta hotela ĉielskrapanto, nubskrapanto... Ŝi laboradis kiel meza estro ĉe Tupperware por savi ĝian komercon pri plastajoj. Revenante el Filipinoj al Kanado, mi vizitis ŝin tie en Tajlando. Ĉe la granda flughaveno, mi feliĉis ekvidi mian onklinon, kiun mi ne vidis dum longa tempo.





El flughaveno al la hotelapartamento, la urbo tre imponis min. Estis ŝajne pli ordeme ol Manilo tiam... La strata trafiko ŝajne ne estis tro kiel en Manilo. Sed ja, ekzistis multe da strattrafiko. Mia onklino havis ŝoforatan aŭtomobilon. La amikeca ŝoforo nomiĝis Khun Santi, alteska tajo.



Estis granda apartamento ĉe la Direktora Loĝejo de la Korto Pantip (68 Soi Atthakarnprasit, vojo Suda Sathorn, Bankoko 10120). Kaj oni donis dankon al dioj, ke ĝi havis klimatizadon... Estis ŝvite varmege sub sunbrilo ekstere. Freŝe ene estis grandioza loko, kie tajaj servistoj plenumis la akvon en ceramikaj potoj per flosantaj tropikaj floroj. Tiuj troviĝis en ĉambro kaj ĉie en la konstruaĵo. Ĉe la hotelĉambro, ligna bovlo da ekzotikaj tropikaj fruktoj atendis nin. Tra

La granda fenestro, mi povis vidi la pejzaĝon de la urbego, vera abelujo. La estro de mia onklino estis britdevena aŭstralianino kaj la najbarino de ŝi.

La tajoj imponis min per siaj ridetoj kaj bonaj varmetaj kondutoj. Temis pri la kreditsistemo, kiu estis Budaismo. Aro da belaj tajaj dancistinoj en tradiciaj vestoj swingis la manon al mi...

Ne tro da tajoj vere parolis la anglan. Ĉe la kurzejo, monŝanĝantoj apenaŭ parolis la anglan. Ĉe la Korto Pantip, la taja servistino ne parolis ĝin kune kun varmetaj ridetoj. La tona taja lingvo sonis melodie...



*Mi vidis multon da aferoj ĉe Bankoko mem:
la bazarojn, la butikarojn, la restoraciojn, la
grandajn palacojn, la templojn, kaj tiel plu...
La temploj estis mirindaj pro siaj elegantaj
arkitekturoj. Ekzistis statuoj de Budao el
variaj formoj, materialoj, koloroj, kaj tiel
plu...*



Apud la hotela vestiblo, ekzistis restoracio. La taja kuirarto estis unu el miaj favorataj. Multe da ĝi estis spicitaj. Ekzistis desertoj, kiujn oni neniam trovis en tajejoj en Kanado. Speco de ili estis varikoloraj florformaj el

gluriza materialo simile al la "kutsintâ" de Filipinoj.



La estro Nan, la aŭstralianino, estis komedie, ke ŝi mendis regule manĝaĵojn el ruĝaj akvomelonaĵoj: supojn, trinkaĵojn, kaj tiel plu... Ŝi kontrolis sian dieton pro tropezeco. Ŝi antaŭe loĝadis en Filipinoj kaj ŝi konsideris ilin sia adoptata lando.

Mi havis ŝancon travojaĝi la kanalojn (klong). Bankoko estis la Venecio de la Oriento. Oni povis mendi manĝaĵojn el boatoj. Multe da tajoj loĝis apud kanaloj je variaj socioekonomiaj niveloj. Estis riĉuloj. Estis malriĉuloj. Alia intriganta transporto estis la tuk-tuk, kiun mi ofte prenis en la urbo. Ĝi, varikolora motortriklo, sonis kiel "tuk tuk tuk..." ĉe la stratoj.



La zigzageta eleganta taja skribsistemo imponis min. Mi trovis la japanan Kana pli facile legebla, sed se mi metus mian menson lerni la tajan, mi certe kapablus lerni ĝin, tre barokan... La komputiloj en Tajlando kapablis la lingvon. La klavaro montris la tajajn literojn.

La bazaroj estis plene de ekzotikaj manĝaĵoj. Ekzistis multe da sekitaj loligoj, fiŝoj, kaj tiel

plu. Ekzistis ravaj ekzotikaj tropikaj fruktoj. Ekzistis sizigioj, kiujn Filipinanoj ofte nomis makopa, kiuj estis mia favorata el knabeco. Kokoso estis alia... (La sizigioj ĉe la bildo similas al tiuj en Bankoko, sed la Bankokaj estis longaj... Kutime troveblaj estis ili en bazaroj en Tajlando, sed ne en Filipinoj...)



Per la ŝoforo Khun Santi, ni aŭtomobilis norden el Bankoko al la kultururbo de Ayutthaya, centro de antikvaj pagodoj kaj religiemaj konstruaĵoj. La temploj kaj ruinoj tre imponis min, simile alimonde aljarcente kiel konstruaĵoj en Star Trek. Ayutthaya estis kampareska urbo. La vetero estis varmega kaj ekzistis dankinde klimatizado

en la aŭtomobilo kaj en la pli modernaj konstruaĵoj. La urbo estis bona loko por mediti!



Ni vizitis ankaŭ la krokodilejon. En spektaklo, viro metis sian kapon en la buŝo

de krokodilo. Ankaŭ serpentejon ni vizitis.
Mi havis ŝancon, ke alia fotis min kune kun
serpentejo ĉirkaŭ miaj ŝultroj. En elefantejo,
mi rajdis elefanton.





Reveninte al Kanado, pli malfrue, mi pli lernadis pri la taja kulturo kaj lingvo. En Vankuvero, mi regule iris al taja templo...

(Mi forgesis mencii, ke mi vojaĝis tra Tajlando ankau kune kun mia avino Lydia.)

